

Literatura Mondo, 17-a parto : La stilo de Hans Weinhengst
laŭ la novelo *Ŝtelita infaneco*
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 643, 1976.02.04 & 07

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La pasintan semajnon ni diris kelkajn vortojn pri **Hans Weinhengst**, esperanto-verkisto restinta nekonata, aŭtoro de la romano **Tur-strato 4** kaj de noveloj. La dua mondmilito kaj la naziismo tro frue mortigis tiun ĉi talentan verkiston.

A.- Por doni al vi ideon pri la stilo de **Hans Weinhengst** ni legos al vi kelkajn erojn el sufiĉe longa novelo titolita **Ŝtelita infaneco** aperinta en **Literatura Mondo** en 1935, unu jaron post la apero de **Tur-strato 4** kaj eble la ĝermo de romano neniam publikigita. Temas pri la sinsekvo de edukeraroj, kiuj kondukas knabon al pundomo. Realisma verko, kiu unue priskribas la sintenon de Fredo, filo de drinkulo kaj de ftiza patrino, kies amo subite malaperas. Aŭdu !

Cl.- « Estis varmege. La suno sendis ardajn radiojn de sur la blua ĉielo. Fredo kaj la patrino ŝvitegis. La virino fartis tre malbone kaj ofte interrompis la falĉadon de herbaro por pene ekspiregi. En la brusto ŝi sentis pikajn dolorojn kaj en la kapo svenemon. Tamen post ĉiu ĉeso ŝi baldaŭ rekomencis la laboron.

A.- Al la knabo plaĉis la bela tago. Li kunrastadis la falĉitajn herbojn, kolektis florojn, kaptis akridojn, kiujn li rigardis kaj reliberigis, saltetadis tien kaj reen kaj faris transkapiĝojn pro ĝojo. Kiam li foje rimarkis, ke lia patrino ĉesis labori kaj kun dolora ekĝemo fermis la okulojn, li alkuris timigite kaj demandis kunsente, kio ŝin premas. Sed ŝi trankviligis lin, dirante ke nur la varmegego iom lacigas ŝin, kaj Fredo ree ĝojis kaj amuziĝis.

Cl.- Rikoltinte sufiĉe da herbaĵo, ili pakis ĝin en grandan kaj malgrandan tukojn. La grandan portis kompreneble la patrino, la malgrandan pakajon la filo. Ili jam proksimiĝis al la vilaĝo, kiam la patrino ekŝanceliĝis kaj subite teren falis sub sia peza ŝarĝo. Fredo forĵetis la sian kaj kuris al la patrino, kiu ĝemadis kaj ne povis leviĝi.

A.- Per balbuta voĉo ŝi petis la knabon, ke li kuru en domon kaj venigu helpon. Baldaŭ li revenis kun du virinoj, kiuj alportis akvon kaj vinagron. Ili malsekigis la tempiojn de la svenintino kaj gutigis la miskaĵon el akvo kaj vinagro en ŝian buŝon ; pli la bonaj virinoj ne sciis fari.

Cl.- Fine la malsanulino ekstertoris kaj malfermis la okulojn. Iom post iom ŝi tiom konsciiĝis, ke ŝi alvokis sian filon per malforta voĉo. Kiam li plorante kliniĝis super ŝia vizaĝo, la patrino kisis lin kaj flustris dutrifoje : « Mia kara, kompatinda bubo ! » kaj ankaŭ ekploris. Poste ŝi denove fermis siajn okulojn, spiretis malfacile, pli kaj pli malforte kaj finfine tute senmoviĝis.

A.- Dum kelkaj semajnoj post la enterigo de la patrino, ĉe kiu la malgranda Fredo kondukis malespere kaj plorvokis korŝire sian panjon, lia onklino – fratino de la patro – laŭpove prizorgis la domon. La patro iris al sia laboro kiel kutime kaj la knabo, pri kiu neniu krom kelkaj kompatemaj najbarinoj multe zorgis, iradis aŭ sidadis ie, kiel funebranta ombro de sia propra antaŭa memo. Li iĝis silentema kaj timema, evitis la homojn, apenaŭ manĝis kaj se oni volis paroli kun li, oni devis kvazaŭ tiri el li ĉiun vorton. ...

Cl.- **Hans Weinhengst** poste priskribas la pli kaj pli draman situacion de la knabo. La patro pli kaj pli ebriiĝas. « Iutage fremda juna virino venis en la domon. Ŝi estis tre laborema kaj energia kaj ekkreis ordon en la jam malzorgita hejmo. Komence ŝi interesiĝis pri Fredo kaj traktis lin afable. Sed vidante, ke la knabo ne volas fidi al ŝi, neniel venas renkonte al ŝi kaj apenaŭ okupas loketon en la koro de sia patro, ŝi baldaŭ severiĝis kontraŭ Fredo. Kaj ĉar li ne ŝanĝiĝis, eĉ male, pli obstiniĝis, li fine ricevadis pli da insultoj kaj batoj ol da manĝaĵoj. ... »

A.- Same okazis en la lernejo. Jen ni ree citas **Hans Weinhengst** : « En la lernejon li venis sen taskoj, kelkfoje eĉ tute sen lerniloj, kaj neniam li estis mense ĉe afero pritraktata. Komence la instruisto ja lasis lin trankvila, poste li provis reaktivigi lin per konsolaj kaj milde admonaj vortoj. Finfine li malpacientiĝis kaj ekstraktis lin severe, sed sen kontentiga rezulto...

Cl.- « Ankaŭ kun la lernejoj gekamaradoj Fredo tiam konstante malpaciis. Ili malamis lian silentan konduton kaj apartiĝemon, sentis sin ofendataj per ili kaj volis devigi lin al certa solidaro, al partopreno pozitiva aŭ negativa. Ili sukcesis fine, en negativa senco. Li montriĝis malica, ĝenis la ludojn kaj rikoltis batojn. Li komencis fari maldecaĵojn kaj malicajn petolaĵojn. Baldaŭ oni akuzis lin pri ĉiu fibubaĵo, se oni ne povis eltrovi la farinton. Fine do ne plu pasis tago, en kiu Fredo ne ricevis batojn de iu. Lia famo en la tuta ĉirkaŭaĵo iĝis tiu de malgranda sentaŭgulo kaj misfaranto. ...

A.- « Tamen ... la knabo esence restis same sentema kaj amsopira kiel antaŭe. Kaj neniu pli suferis pri lia ŝanĝiĝo al la malbono ol li mem. Kiam neniu povis lin vidi, li ofte ekploris korŝire. [...] Nemale ofte okazis, ke nokte, vekinte el dormo en kiu sonĝo iluziis al li estadon kun la mortinta panjo, li skuiĝis en akra plorado. Tiam li tute kaŝiĝis sub la litkovraĵo kaj singultadis konvulsie, ĝis li ree ekdormis kaj ree renkontis sonĝe sian patrinon, kiu konsole sekigis liajn larmojn. Ankoraŭ post jaroj li ofte sonĝis kaj pensis pri ŝi. Kaj en lia koreto tiom elkreskis ŝia idealfiguro, ke en ĝi apenaŭ estis loko por iu alia. »

Cl.- En **Literatura Mondo**, 1935, vi povos finlegi tiun ĉi tragedion, kiu atestas, ke **Hans Weinhengst** estis granda hompriskribanto. Per lia tro frue morto la esperanto-literaturo perdis multon.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!